

## Zamenhofa tago

Claude Gacond, 166-a radioprelego, 1966.12.14 & 1966.12.17

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi semajnon estas festata en la tuta mondo la zamenhofa tago. En la grupoj oni vendas esperantajn librojn, en la gazetoj oni parolas pri la vivo aŭ influo de la aŭtoro de la lingvo internacia.

A.- Unu el la vigloj de nia movado estas la starigo de kutimoj. Per ili ni ekkonscias pri nia unueco. Per ili ni kreskigas Esperantujon.

Cl.- La kolektiva vivo bezonas kolektive akceptitajn kutimojn. Tiom longe kiam homa grupo ne povas akordiĝi por konsenti pri komuna idearo, tiu grupo ne formas veran kolektivon.

A.- Pri tiu socia fenomeno klare konsciis Zamenhof. Pro tio li akceptis ludi dum la pionira epoko de nia movado la rolon de la Majstro. Lia personeco, lia persono, liaj verkoj anstataŭis la komunajn kutimojn kaj pensmanierojn, kiuj tiam ankoraŭ ne povis ekzisti.

Cl.- Estas ankaŭ pro tio, ke Zamenhof favoris ĉiujn serĉojn al komunaj simboloj. Kiam la esperantistoj ekuzis la verdan koloron por simboli esperanton, tiam Zamenhof tuj apogis tiun emon. Poste, kiam esperantisto proponis novan simbolon: tio estas la kvinpinta stelo, tiam Zamenhof ankaŭ aprobis la ideon.

A.- Li sciis, ke akcepto de komunaj simboloj nur povas fine konduki la akceptantaron al akcepto de komuna ideologio. Nia literaturo nun raportas pri lia klarvido. La radikoj **verd** kaj **stel** akiris en nia lingvo tiom da signifoj, ke estas preskaŭ neeble traduki nacilingven frazon, kie ili simbole estas uzataj.

Cl.- Ĝenerale la esperantistoj estas homoj, kiuj ne tro ŝatas la flago-adoradon. Tamen kiam inter multnaciaj standardoj flirtas la esperanta simbolo, tiam ni sentas nin ĝojigitaj. Mi forte sentis tion dum kongreso en la urbo Konstanco vidante nian flagon okupi centran lokon en standardovico sur la ĉefponto de la germana urbo.

A.- La esperanta flago simbolis por mi kaj por la ceteraj partoprenintoj la venkon de nia homaranismo super la naciismo. Kaj kiam oni kongresas en lando, kie la naci-adorado kondukis al la naziismo, tiam oni vere sentas fieron aparteni al movado, kiu starigas pontojn inter la popoloj, anstataŭ starigi malamojn inter la gentoj.

Cl.- Dum la nazia epoko la espero esperantista rifuĝis en fakojn ankoraŭ permesitajn aŭ ne persekutatajn. Unu el la ĉi-jaraj numeroj de *Germana Esperanto-Revuo* raportas pri tiu terura iompostioma venko de la ŝovinismo super la esperantismo en la hitlera Germanio. Monaton post monato la malpermesoj praktiki esperanton multiĝis, kaj baldaŭ scii esperanton, lingvon kreitan de judo, fariĝis krimo kontraŭ la nacio. Ni povas imagi la kuraĝon, kiu estis necesa al niaj samideanoj por pluporti la torĉon.

A.- Lodewijk Cornelis Deij, kiu estis nur dudekjara, kiam la mondbuĉado komenciĝis kaj kiu vidis la barbarecon de la antisemitismo kaj la abdikon de la eklezioj antaŭ la faŝisma religio, verkis en nia homarana lingvo poemojn, kiuj eterne riproĉos nian mankon de kuraĝo por defendi la subpremitojn.

Cl.- Naciismo ne mortis. Eĉ en Germanio ĝi rajtas postvivi, kaj en Sudafriko ĝi science persekutas la kolorulojn. Mia bofratino Cosette Giroud, kies voĉon vi aŭdis pere de nia radio dum la printempo, nun laboras en Alĝerio. Ŝi ricevis leteron de Bob Kok, esperantisto kiu estas forpelita el Sudafriko pro sindikata kunlaboro kun la persekutataj nigruloj. Li vivos nun en Nederlando kaj intencas prelegi en esperanto por rakonti, kio nun okazas en lando, kie

Zamenhofa tago  
Claude Gacond, 166-a radioprelego, 1966.12.14 & 1966.12.17

antihomaranismo sklavigas la loĝantaron. Kiam li trapasos Svislandon, ni invitos lin al nia radio.

A.- Atendante tiun intervjuon ni revenu al Lodewijk Cornelis Deij kaj meditu lian poemon titolita *Al la juda foririnto*. Tiun poemon vi povos relegi en la *Esperanta antologio*. Aŭdu :

Cl.- *Li fermis la kofron, manpremis – adiaŭ !  
Sen ia protesto li iris... Hodiaŭ  
mi tion komprenas; li povis nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Kun kapo klinita la kofron li portis.  
Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis  
sen ia protesto... Li povis nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Kaj iam la filo kun filo parolos,  
kaj tiu demandos, la veron li volos.  
La mia silentos... kaj povos nur miri,  
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Ni sentis kompaton kaj monon kolektis,  
dum kelkaj el ni la infanojn protektis.  
Sed Auschwitz **ekzistis** ! Nu, kion plu diri ?  
Ke mi kaj ke vi... ni lin lasis foriri.*

A.- La zamenhofa festo estu kutimo, kiu disvastiĝu pere de nia lingvo. Apud la naciaj festoj, kiuj hodiaŭ vekas malagrablan senton pri tro da sangaj rememoroj, la festo de la homaranismo veku en ĉiam pli da koroj la esperon kaj certecon, ke foje sur la tero persekuto al malplimultoj estu nur barbareco de la pasinta tempo.

Cl.- Sed tiu tago alvenos nur, se ankaŭ ni, la esperantistaro, ne abdikos antaŭ la ideologioj kontraŭaj al la nia. Kiam oni studas la biografion de Zamenhof, oni nur povas miri, kiom da influo povas havi nur unu sola sen-tima homo super la fortoj de la malbono. Ni, la heredantoj de Zamenhof, havas trezoron, kiun ni devas disdoni al ĉiuj homoj. Tiu trezoro estis unue lingvo, kiu estis kaŝita en broŝureto kelkcent-radika. Hodiaŭ ĝi ankoraŭ estas nekonata por multaj, sed ĝi ne plu estas kaŝita en kelkaj libretoj. Senĉese leteroj, gazetoj skribitaj en nia lingvo atestas, ke super la landlimoj homoj apartenas al supernacia popolo.

A.- Kaj la radio-ondo ne haltas antaŭ la limoj de landoj, kie nia lingvo estas persekutata. Ili kontraŭe pli kaj pli helpas nian lingvon disradii kaj proklami sian pacan mesaĝon.

Cl.- Vi aŭdis radio-elsendon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-